

Francilia federacio

Komitatkunsido (KK) Ven 10/06/2022

Partopreno

- Pierre Gauthier, vic-kasisto kaj reprezentanto ĉe Espéranto France (PG) ĉeestas
- Marc Giraud, prezidanto (MG) ĉeestas
- Didier Janot (DJ) sin ekskuzis
- Aleks Kadar, vic-sekretario (AK) ĉeestas
- Aurélien Lestage (AL) ĉeestas
- François Lo Jacomo (FLJ) ĉeestas
- Didier Loison, kasisto (DL) sin ekskuzis kaj estas reprezentata de LPI
- Laure Patas d'Illiers, sekretario (LPI) ĉeestas
- Marianne Pierquin, vic-prezidanto (MP) ĉeestas
- Guillaume Vera-Navas (GVN) sin ekskuzis

N.B. Ne konfuzu inter **komitato** kaj **estraro**. La komitato enhavas la ĉi-suprajn 10 homojn. La estraro enhavas 6 homojn, t.e. la komitatanojn, kiuj ludas la ĉi-suprajn statutajn rolojn.

Adreso info@esperanto.paris

La adreso info@esperanto.paris estas uzata de la publiko por starigi demandojn pri nia asocio. Ĝi sendu al la estraranoj kaj Saïd Baluĉi. Tion LPI petos de Emmanuelle Richard. La estrarano kiu prizorgos la mesaĝon kunsendos sian respondon al la sama adreso por sciigi al la aliaj estraranoj ke la mesaĝo estis prizorgita.

Ekde la antaŭa KK

La protokolo de la Ĝenerala Asembleo 2022 estis enretigita al <https://esperanto.paris/IMG/pdf/protokolo-2022-03-19.pdf>

La protokolo de la KK de la 19/03/22 estis aprobita kaj enretigita al <http://esperanto.paris/IMG/pdf/2022-03-19.pdf>

PG reprezentis nin en la dua komitatkunsido de Esperanto France dum la nacia kongreso. En la unua reprezentis nin FLJ.

Stato de nia asocio

Nombro de membroj: hodiaŭ ĝi estas 114. (Nun, 18/06/22, ĝi estas 115).

N.B. La listo de niaj membroj videblas per la jena ligo, nun alirebla nur al LPI.

<https://esperanto-france.org/arthur/requ%C3%A0te.php?id=5501084>

Post la ĜA, ni petis de Espéranto France ke la ligo estu permesata al nia tuta estraro.

Aĝo: estas malpli ol 10 junaj membroj.

Financo: dum la ĜA la financa raporto anoncis profiton de 713€ en 2021. Dum la ĜA ni decidis donacojn de 1.050€, kiuj kreos malprofiton en 2022. Do ni evitu pliajn elspezojn.

La poŝta banko petas informojn pri la estraro: DL sendis al la estraro formularon kaj petas subskribon komence de nia kunsido (farita de MG kaj LPI post la kunsido).

ĜA de JEFO

JEFO ne tre viglas, ili provas fari projektojn. AL provas ligi la franciliajn membrojn. Estas deziro, ke la Poliglota kafejo denove okazu, oni serĉas volontulojn por deĵori tie. La estraro ŝanĝiĝis, la prezidanto estas Inès, la kasisto Julien.

FLJ demandas al Jesper, ĉu lia kurso plu okazas en ENS. (Post la kunsido: Jesper respondis jese.)

Matematika foiro

Ĝi ĵus okazis 2-5/06/22. Prizorgis FLJ, deĵoris AL, DL, LPI, PG, Elisabeth Barbay, Melono kaj Lucien Bresler. La rezulto estas kontentiga, pro la fakto ke ĝi estis surloka. La televido kun videaĵoj montriĝis utila, oni ankaŭ ludigis videaĵon ĉiaman. La ludo de Elisabeth pri nombrado tre sukcesis. FLJ varbis unu virinon kiu deziras kurson por komencantoj. Venontfoje ni kunportu pli diversajn materialojn. Eble eĉ krei specifan disdonendaĵon? Ĉu ludojn ? AL estas pripensanta pri ludo. Dum la foiro, ni difektis materialon de Espéranto France, FLJ ekzamenos ĉu ĝi ripareblas.

Voix sur berges (26/06/2022)

Ĝi okazos 26/06/22. La esperanta koruso "Interkant" kantos en Esperanto. Ĝi provludos sabaton 25 posttagmeze kaj dimanĉon 26 matene en la sidejo. La kantistoj venos el ĉie en Francio kaj petas gastigadon por la nokto inter sabato 25 kaj dimanĉo 26.

Journée de l'Europe à Antony (25/06/2022)

Ĝin prizorgos FLJ kaj AL. Helpo bonvena. Eble AK venos. Oni povas uzi la afiŝon de EDE post eltondado de la politikaj informoj.

Fête des associations de Paris Centre (03/09/2022)

Ĝi okazos 03/09/22. La budo estas senpaga. DL pretas prizorgi, LPI pretas deĵori. Eble MP kaj Saïd Baluĉi. LPI respondos antaŭ 25/06/22 per la jena formularo

<https://docs.google.com/forms/d/e/1FAIpQLSeSf3ScHX5329JEsIqci-g2sUGltG-8WFh5zYYJqenGWME3cw/viewform>

Homara Festo (9-11/09/2022)

Ĝi okazos 9-11/09/22. Ni sugestis al Espéranto France mendi pagendan budon kaj dividi la koston kun FLJ. La decido estas jesa. Do nia asocio pagos nenion sed membroj deĵoros. Restas: varbi deĵorontojn. AL petos al membroj de JEFO, LPI en la dissendolisto. AK kreos tabulon por organizi la tagojn kaj horojn, ekzemple per Framadate. Prepari materialon, transporton. Al la kasisto de EF: pagi la budon. AK devas mendi la budon. AK rigardos ĉu estos elektro en la budo por uzi la televidon. AK devas peti

ŝildeton "macaron" por la veturilo.

Ĝemelaj urboj Romo-Parizo

- Ĉu vojaĝo al Romo en aŭtuno 2022 (Ĉiusanktuloj) ?
- Ĉu invito de la Roma klubo en Parizo kadre de nia jarkunsido en marto 2023 ?

Ni preferas inviti la Romianojn en Parizo en marto 2023 dum semajnfino. Dum venonta reta kunsido ni proponos la principon al la italoj. Se ili konsentos, ni pripensos la buĝeton dum posta KK. Antaŭpensitaj: vizitoj, biciklado, ludsiesio, ktp.

AK rememorigas ke okazos reta babilado ĉi-dimanĉon 12-an/06 18:00 CEST

Agadoj pluas

- Babilrondo Parizo-Romo ĉiumonate la 1-an sabaton
- Legoklubo okazis 30/04/22 pri la libro "Sur bluaj planedoj"
- Esperanto-kafejo ĉiumonate la 2an sabaton vespere
- Epéranto café-croissant ĉiumonate sabate matene
- Kultura vespero la 1-an merkredon (spekto de filmo, ateliero pri verkado) kaj la 3-an merkredon (plufilmado de humura skeĉo)
- Ludoj ĉiumonate la 2-an dimanĉon, AL kontentas

Projektoj antaŭeniras

- Kontakti la mezlernejojn: GVN
- Kontakti la publikajn bibliotekojn: MP, ni aĉetis dekon da Metodo11 por disdoni
- Subglasoj: GVN ni kundividis la elspezon kun Esperanto 94
- Vojaĝoj de Lucien Péraire: okazis prelego, Régis Fournier kreis filmeton, la notoj estas ciferecigitaj, GVN preparas ekspozicion por 2022
- Ministerio pri financaj aferoj: DL, LPI, PG
- Kromaj kursoj por prepari kandidatojn al la KER-ekzamenoj: FLJ
- Malfermaj pordoj: tuj post la Homara Festo kaj antaŭ la komenco de la kursoj, sabaton 17-an/09: organizota
- Duolingo: oni rajtas reklami en Duolingo niajn eventojn nur se ili okazas rete per ilia zoom salono, nur tiel oni povus allogi duolinganojn. AL pripensas organizi rapidan enkondukon pri EO kaj nia asocio.

Kursoj

- 1a nivelo gvide de MG, rete, marde vespere, 4 ĝis 8 homoj
- 2a nivelo gvide de MG rete, marde vespere, 4 homoj
- 2a nivelo gvide de Michèle Abada-Simon (MAS) surloke en la sidejo, ĵaŭde vespere
- 3a nivelo gvide de FLJ surloke en la sidejo, marde vespere

Ĉiuj kursoj finiĝis, krom tiu de Michèle kiu finiĝos fine de junio.

DL proponis rabaton pri kurso en la retejo IDF-mobilité (per kontakta formularo) sed ne venis respondo.

Por la jaro 2022-2023 okazos ŝanĝoj. Michèle Abada-Simon ne plu instruos, MG gvidus nur unu kurson. Ni ricevis demandojn pri kurso por komencantoj. Ĉu iu volontulas por instrui? Jes, PG kaj MP.

Listo de kursoj 2022-2023:

- komencantoj, gvide de PG, ĵaŭde vespere, surloke
- progresantoj, gvide de MP, lunde vespere, surloke
- progresantoj, gvide de MG, marde vespere, rete
- spertuloj, gvide de FLJ, marde vespere, surloke

La kursoj komenciĝos en oktobro.

Respondeculoj pri agadoj (memorigo)

- Ĝemelurbo kun Romo: MG
- Legoklubo: MG
- Ludoj: AL kun Marielle Martin
- Ekzamenoj (nur por reklami kaj helpi al preparado al ontaj retaj ekzamenoj): FLJ
- Esperanto-kafejo: GVN
- Espéranto café croissant: GVN
- Kulturaj vesperoj: PG, LPI, Régis Fournier, ĉiumonate merkrede la 1a kaj eble la 3a
- Prelegturneoj (kiam eblas): FLJ

Post evento, iu partopreninto aŭ la organizanto sendu informojn (foton, mallongan priskribon en la franca) al teamo.esperanto.aktiv@esperanto-france.org por publikiĝo en la sekva reta monata gazeto Esperanto-Aktiv

Respondeculoj pri informkanaloj (memorigo)

La unua kanalo estas la retejo <https://esperanto.paris> la aliaj kanaloj reeĥas la informojn.

- Retejo DJ (AL)
- Facebook MG DL MP
- Twitter.com/esperanto_paris PG
- Dissendolisto Amikaro LPI (MG)
- Telegramo AL
- Amikumu PG
- Eventa Servo MG AK (MP)
- Meet-Up DJ

Venonta KK

KK okazas trimestre. La venonta KK okazos 06/09/22 je la 7-a ptm, prefereble surloke, se necese mikse.